



**FLANDRA
ESPERANTISTO**
MONATLA REVUO
ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

ENHAVO :

La estiĝo de la Flandra movado. — Iom pri Felix Timmermans. — Somera Pluvo. — Februaro 1918. — Flandraj Kantoj Esperantigitaj. — Aŭtunaj impresoj. Bretona Herokruco. — Kvarfolia Trifoli'. — Inter ni. — Bibliografio. — Subteno por nia revuo. — Esperanto door Zelfonderricht. 4^{de} Les. — Diversaĵoj. — Ĉeĥoj kaj Slovakoj.

JARA ABONPREZO : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

FLANDRA ESPERANTISTO

Organo de la Flandra Esperanto-Movado

APERAS ĈIUMONATE.

Redaktoro kaj Administranto :

JAN VAN SCHOOR

Julius De Geysterstraat, 149/1, Antwerpen.



Jara abonprezo : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

Poŝtĉeko : 1735.09

LA ESTIĜO DE LA FLANDRA MOVADO.

Kontraŭ la orienta marbordo de Anglujo, limata de Francujo, Germanujo kaj la Norda Maro troviĝas la historiaj Nederlandoj, kies norda parto nomiĝas Holando (19a. jc.) kaj suda parto Belgujo (1830). En tiu suda parto la lingvolimo ne similas al la politika. Belgujo konsistas el du partoj, ĉiu kun propra lingvo. En la norda loĝas la Flandroj (4 milionoj); en la suda la Valonoj (3 milionoj). La lingvo de la Valonoj estas la Valona (Romana) kaj ĉefe la franca kiel literatura lingvo. La lingvo de la Flandroj estas la Flandra, kiu apartenas al la grupo de la Germanaj lingvoj. La Flandra, la Holanda kaj la Nederlanda estas tri nomoj por la sama lingvo.

La teritorio de la Nederlanda estas ekster Holando kaj Flandra Belgujo, parto de Franca Flandrujo, la Nord-Nederlandaj kolonioj kaj Sud-Afriko. En la Nordaj Ŝtatoj de Usono vivas krom tio ampleksa Nederlande parolanta loĝantaro.

Dum la mezepoko oni nomis la lingvon „Dietsc” aŭ „Duutsc”, la lingvo de la „diet” : popolo, kontraŭ la latina, la lingvo de la kleruloj. Je la fino de la 16 jc. ĝi nomiĝis „Nederduitsch” aŭ „Duitsch” kaj fine „Nederlandsch”. La Nederlanda lingvo estas la kulturlingvo de Flandroj kaj Holandanoj kaj estas parolata en la mondo de pli ol 13 milionoj da homoj. Tiu lingvo, jam de la 12a. jc. servas al poetoj, filozofoj, juristoj, teologoj, scienculoj kiel ilo por iliaj ideoj kaj pripensoj. La Nederlandoj jam de la frua mezepoko sin distingas per propra kulturo de siaj najbaroj. La du fratoj Van Eyck, Rubens kaj Rembrandt ekzemple estas la brilaj reprezentantoj de ĝia pentrarto kaj ĉiaj ĝiaj artmanifestadoj elmontras nacian karakteron.

Ĉar Flandrujo en la estinteco estis uzurpita de Francujo kaj iĝis franca feŭdo, regata de francaj feŭdestroj, la franca lingvo disvastiĝis en ĝi kaj la francaj kulturo kaj literaturo havis kaj havas grandan influon. Dum la regno de la Burgondaj Dukoj (15a. jc.) precipe la franca influo estis malutilega por la flandra popolvivo kaj nacia lingvo. Jam frue venis kontraŭstaro kaj jam en 1290 estis difinita ke *Ibi litigabitur more solito secundum ydioma loci* kaj tiel la flandroj ĉiam daŭrigis postuli sian bonan rajton kaj kontraŭstari la neleĝan uzon de la franca lingvo.

Pli fatala ol ĉiu centriga regado estis la estiĝo en Flandrujo de kasto, kiu parte pro memprofito kaj parte por sin distingi de la ordinara popolo, preferis la francan super la popola lingvo kaj tiu kasto pli kaj pli fremdiĝis de sia propra popolo kaj poste ĝi malhelpis tiun popolon perfektigi per la nacia lingvo. Tiel la franca pli kaj pli iĝis necesa al tiuj el la popolo, kiuj volis alveni al pli honora aŭ reganta rango. Tiu situacio daŭris ĝis hodiaŭ, favorita de centriga ŝtatinstytucio, precipe dum kaj post la franca direkta superregado (1794-1813). La presigo de flandraj libroj kaj ĵurnaloj estis malpermesata kaj la instruado de la franca lingvo estis deviga.

Post la kuniĝo en 1815 de nuna Belgujo kun Holando (la malnova 16 jarcenta revo!) kiu jam en la 17a jc. regajnis sian sendependon, la situacio iom pliboniĝis, sed pro diversaj plendmotivoj, lingvaj kaj aliaj, kontraŭ la ne ĉiam lerta politiko de la holanda reĝo Willem I, precipe flanke de la Valonoj, venis revolucio kun la helpo de 100.000 francaj ekzilintoj. Ili nur intencis la anekson al Francujo kaj kiam la holanda registaro volis agi, franca armeo tuj estis preta por ĝin kontraŭstari. La nuna Reĝolando Belgujo estiĝis kontraŭ la origina volo de siaj stariĝintoj, naskiĝis el fremda enmiksiĝo.

La konstitucio dekretis la *liberecon* de la uzado de la lingvoj kaj poste tia libereco estis komprenata de la registaroj kiel.... nur ekzistanta por si mem kaj ne por la popolo : sufiĉis al oficistoj, kiu tamen devis interrilati kun flandra publiko nur koni la francan lingvon.

La veraj intencoj de la unuaj registaroj parolas klare el la vortoj de Charles Rogier (Franco... kaj unua belga ministro), kiu skribis :

„La ĉefa principo de bona administracio estas bazita sur la nura uzado de unu lingvo kaj estas kompreneble, ke la nura lingvo de la Belgoj devas esti la franca. Por atingi tiun rezulton, estas necese ke ĉiuj oficoj estu aljuĝataj al Valonoj kaj Luksemburganoj ; tiamaniere la Flandroj tempe forigataj de la favoroj de tiuj funkcioj estos devigataj lerni la francan lingvon kaj tiamaniere oni detruos iom post iom la ĝermanan elementon en Belgujo (et l'on détruira ainsi peu à peu l'élément germanique en Belgique)”.
.

Kaj al Lord Palmerston la sama skribis :

„La penado de nia registaro devas streĉi al la detruo de la flandra lingvo por prepari la kuniĝon de Belgujo kun la granda patrujo Francujo”.

Jen vortoj de... Belga ministro ! Per tia politiko okazis, ke flandre parolanta plimulto estis regata de la franca lingvo, la lingvo de la malplimulto, tial ke per la organizo de instruado, Juĝopovo kaj administracio estis metita sur ĉio estis flandra, la ŝtampon de malsupereco. Oni ne miru, ke tial la francigo de la burĝaro pli kaj pli progresis kaj eĉ minacis la popolon mem, sed tial estas ankaŭ kompreneble ke baldaŭ kontraŭago naskiĝis, unue malrapide sed poste pli rapide kaj akre : la Flandra movado.

TYNEVERUM.

Iom pri Felix Timmermans (*)

Kiam Felix Timmermans estis proksimume 19-jara, li ekstudis filozofion ; tiam oni subite sciigis al li, ke homo havas sep korpojn anstataŭ unu, kaj kiam li studis, studegis pri ĉiuspecaj ismoj, li ekvagis en la krepuskoj de la Morto. En tiu tempo ok kranioj ornamis la kamenon de lia ĉambreto. Li klopodis harmoniigi sian ĉirkaŭaĵon kun siaj sentoj kaj tial li elektis por si dometon en la reviga, trankvila beginejo de Liero (antaŭe oni akceptis tie nur beginojn, sed la milito kaj la loĝejkrizo ŝanĝis tion), kie li senĉese metis siajn pesimismajn ideojn sur la paperon. Sed la pastro finigis tion, iam kiam li trovis lin kun trio da amikoj sin amuzanta per spiritismo pere de la tablo de Felix, nura meblo kiun li havis en sia kabano.

Senespere Felix Timmermans foriris al Valonujo, kie li estus lernonta la francan ; sed baldaŭ li revenis malkontenta : ne plaĉis al li tie ; li sentis, ke li ne estis floreto, kiun oni facile povas transplanti.

Tiam li ekloĝis kun unu el siaj amikoj. Pro enuo ili bruligis hejme ĉiun vesperon kandelojn, kiujn ili estis envicigintaj ; kaj senparole ili rigardis unu la alian aŭ sian senmovan ombron sur la fenestrovitraĵoj.

(*) **Felix Timmermans** naskiĝis en Liero en 1886. Dum la milito li publikigis sian libron „Pallietter”, kiu tuj famigis lin ne nur en Flandrujo kaj Holando, sed ankaŭ en Germanujo kaj la Skandinavaj landoj, kie la traduko estis favore akceptita. Timmermans estas ankaŭ bonega pentristo. Antaŭ „Pallietter” li verkis novelon „La plej belaj horoj de Fraŭlino Simforosa, begineto”, kaj poste „La infaneto Jezuo en Flandrujo”, „Anne-Marie”, „Boudewijn”, „Brueghel”, k. t. p. (Noto de la redakcio).

Sed subite grava malsano finis la ĥimerojn ; Felix devis esti operaciata.

Kiam li en la malsanulejo vidis la morton tute proksima, naskiĝis en li arda deziro por vivi, vivi kiel li neniam vivis. Kaj kiam la religia flegistino dum iu bela somermateno metis florpoteton kun hiacintoj sur



Felix Timmermans.

Desegnaĵo de Piet de Mets.

lian nokttableton, sur kiun ŝtele falis sunradieto, li reviviĝis. En tiuj simplaj floroj li vidis la abundan somervivon de ĉia verdaĵo ekstere ; li deziris salti el sia lito kaj kuri en la naturon, kaj tiam naskiĝis en li la ideon pri kanti de nun la vivon en la libera naturo. Iun tagon, li ŝteleliris spite kuracisto kaj flegistino kaj promenis malantaŭ la Liera beginejo ; li decidis skribi pri tiu belega loko kaj noti ĉiutage siajn impresojn ; tion li efektive faris. Sed baldaŭ li rimarkis, ke io mankis en lia verko : vivanta homo, tute harmoniiganta kun tiu abunda pejzaĝo ; homo, kiu flankenirus pro floreto, sed kiu samtempe kuraĝus trinki. Tian estulon li kondukis en sian verkon, kaj post li Charlot, Marinjon kaj la pastron.

Kiam la libro, al kiu li dum kvin jaroj laboris kaj kiu ampleksis proksimume

kvin kilogramojn da papero, estis tute finita, mankis ankoraŭ la nomo de la heroo.

Kiam Felix iam promenis kun amiko laŭlonge de la remparoj, ili parolis pri la libro kaj lia amiko subite demandis, kiu estas ja la nomo de tiu apetitdona literaturaĵo. Felix iĝis blua, blanka, verda ; li estus sin

kaŝinta en la teron pro embaraso. Jes, tiu nomiĝas... Kadoz, Palim, Pallieter. „Pallieter” ripetis triumfe lia amiko kaj kiam Timmermans aŭdis tiun vorton el la buŝo de sia amiko, li opiniis ĝin tiel bona, tiel taŭga, tiel trafa, tiun vorton, kiu aperigas tiun tutan mirindan estulon antaŭ la okulojn.

Multaj deklaras, ke la vorto „Pallieter” devenas de la greka; estas eble, diras Timmermans, sed mi ne scias la grekan.

Pri „La infaneto Jezuo en Flandrujo” Timmermans povas ja diri, ke estas lia unua verko, ĉar ĝi okupis lin de lia infaneco. Lia patro iris vendi puntajn ĉapojn en la ĉirkaŭaj vilaĝoj per hunda ĉareto. Felix estis la tria de dek ses infanoj! Patrino havis multajn zorgojn kaj estis kontenta, ke ŝi tre frue povis meti la bubojn en la liton. Kiam patro estis hejme, ĉio iris orde: en vico, unu post la alia, ili supreniris la ŝtuparon kaj enlitiĝis, preskaŭ kiel en la rakonto de „Dikfingruleto”. Tiam patro kantis la plej monotonajn kantetojn por dormigi la infanojn kiel eble plej baldaŭ; i. a. li kantis „La tri reĝoj kun la stelo”. Nokte Felix revis pri la personoj el tiu kanto, sed li vidis ilin en niaj nuntempaj vestaĵoj kaj kun niaj kutimoj.

Kiam li estis pli maljuna kaj vojaĝis kun sia amiko en Flandrujo, li vidis-estis strange-ie apud Gento lokon, kiu ŝajnis al li tre konata. Li estis vidanta ĝin en siaj revoj: tie li vidis Jezueton, Marion kaj la aliajn.

Dum la milito la tuta familio preĝis vespere ĉe la lumo de la kameno: patrino laŭtpreĝis per la ĉiam sama, unutona voĉo, kaj ĉiufoje la aliaj zumante respondis. Dum tiuj longaj vesperoj „La infaneto Jezuo en Flandrujo” naskiĝis ĉe Felix Timmermans kaj li viviĝis ĝin...

... Mi nun iom parolis pri „Pallieter” kaj „La infaneto Jezuo en Flandrujo”; alifoj mi intencas paroli pri liaj aliaj verkoj.

MARTHA VERVLOET.

Somera Pluvo

(El „Pallieter” de Felix Timmermans).

Vesperiĝis kaj la parfumo de la blankaj rozoj flosis en la flava aero. Pallieter silentis kaj fumis malrapide sian pipon, dum li, apogante ĉe arbo, rigardis sian ĵustrastitan ĝardenon.

La granda aer-kaj lumovolupto estis subiĝinta kun la vespero en lin kaj nun estis en lia koro grandega trankvilo.

La fumo, kiu leviĝis el la kamentuboj de la beginejo, malplidensiĝis je blanka linio, kiu restis senmove pendiĝanta antaŭ la remparaj arboj.

Tri puraj sonorilsonoj sonoris el la tureto kaj estis kvazaŭ oni trifoje frapis sur la koron de Pallieter.

La tureto staris nigra sur la sukcenflava ĉielo kaj Pallieter iris promeni sur la remparo al la blanka, soleca beginejo.

La griza krepusko tremetis laŭlonge de la blankaj muretoj kaj la pavimoj etendiĝis palaj. La domoj ŝajnis duoble pli altaj, la pordoj fermitaj kaj la trankvilo plenigis la stratojn... Nur du hirundoj rondflugis pepantaj tre alte en la aero.

Pallieter marŝis sur siaj piedfingroj, aŭskultis la silenton kaj eniris en la preĝejon. Neniu estis tie. La brilantaj seĝoj staris serioze en vicoj kaj la sankteja lampo estis kiel okulo. Li eksidis kaj ĉi tiu nerompita senbruo malfermigis al li de kvieto la okulojn. Lia animo malfermiĝis en li kaj ĉio alia estis kiel forgesita revo... Tiel li sidis.

„Mi sentis Dion, sed mi tamen restas homo”, li diris.

Kiam li eliris, la flavo estis eliĝinta el la aero kaj pendiĝis en ĝi grizaj nuboj - sed la tago ne jam estis morta.

Ĉe Pallieter ĉiuj pordoj estis malfermitaj kaj interne estis ankoraŭ malhele. Estis neniu tie...

En la remizo li vidis la brilantan pinton de la pezaj falĉiloj kaj li ekdeziris labori per ili. En la ĝardeno merlo eligis de tempo al tempo linion da ĝojaj sonoj kaj Pallieter diris : „Ekpluvos”.

Li iris falĉi en la ĉevalpaŝtejeto. Li akriĝis la ŝtalon kaj ĝi resonis malproksimen en la trankvila, peza vespero. Li svingis la falĉilon tra la herbo ; la herbo renversfalas kaj la ŝtalo zumis.

Pallieter faris dum la falĉado grandajn movojn kaj siluetiĝis impone kaj malhele sur la pala lumo de la agonianta tago kaj la lumo ne foriĝis de lia falĉilo.

Subite aŭdiĝis bruetado en la herbo kaj en la krepusko li vidis bukedon da flavaj floroj kaj super ili la blankan vizaĝon de Marinjo. Li estis kontenta kaj ŝi alproksimiĝis dirante plena je admiro : „estis kvazaŭ giganto kiu falĉis”.

„Ĉu mi povas flari ?” diris Pallieter kaj li enŝovis sian vizaĝon en la molajn florojn.

„Ili estas por vi”, ĝojegis Marinjo mallaŭte.

„Mi flaras vian animeton en ili ; ho venu” — kaj li prenis la florojn en sian brakon kaj rigardis ŝin dankeme. Li sentis sin kiel infano.

„Venu”, li murmuris, „eksidu ni kaj ekrakontu al mi kie vi ŝirkolektis ilin”. Li eksidis en la falĉita herbo kaj disigis la bukedon sur siaj genuoj. Ŝi eksidis apud li kaj rakontis malrapide, ke ŝi estas irinta kun Charlot al la kampara kapeleto de Sankta Anjo por preĝi ; dumvoje ŝi

estis petinta de kampano tiujn belajn florojn, ĉar li, Pallieter, tiel ofte aspiris ilian mielguston.

Ili silentis. La arboj staris senmove kaj, de el la malhela kuirego, aŭdiĝis laŭta rozaripreĝado de Charlot.

Subite Marinjo time ekkriis : „Guto, ekpluvas”!

Pallieter tenis sian manon malfermita, kaj, post iom da atendo, falis granda freŝa pluvero sur ĝin. „Estas bona kiel fandita butero”, li diris.

Kaj el la nevidebla aero falis malrapide, de tempo al tempo, granda pluvero. Nun ĉi tie kaj poste tie. Ili aŭdis ilin klaki sur la arboj, sentis ilin fali sur sian manon kaj sian nazon kaj droni en la ŝirkolektitaj floroj. Kelkfoje ili falis pliope, kvazaŭ disĵetitaj per plenmano, poste retransviliĝis, sed, post kelkaj korbatoj, ili reaŭdis ilin falantaj ĉi tie kaj tie. Ĉiu guto havis specialan valoron.

La florpharumoj liberiĝis kaj malrapide ekfloris volviĝantaj ĉirkaŭ ili kaj la merlo en la ĝardeno eligis klarajn profundajn sonojn el glata gorĝo. Estis krioj de volupto pro la ĝuo de la freŝa akvo sur ĝia korpo. Ŝajnis al Pallieter, ke la freneza birdo kantis kun unu el la agrablaj akveroj en la beko, tiel plaŭdetis, dancetis kaj saltetis la klaraj notoj ĉirkaŭen. Estis inter ili sonoj, kiujn ĝi suĉis kaj maĉis, reenigis kaj poste kiel glatan, kristalklaran buleton elkraĉis.

Kaj „Mi salutas vin, Mario”, aŭdiĝis konstante en la kuirejo. Ŝia preĝo estis kiel io kio kreskas.

Pallieter kaptis per sia lango guton de siaj lipoj kaj rigardis Marinjon kaj diris kortuŝite :

„Ĉu oni ne fandiĝus en ĉi tia vespero, Marinjo”?

Ŝi rigardis lin kaj diris nenion. Li prenis ŝian manon, kiu estis malseka, kaj kaŝis ĝin sub siajn dek fingrojn.

“Ho Marinjo!” li diris kaj li estus frakasinta ŝian manon, ĉar lia koro leviĝis de amo, kvazaŭ lia animo forflugus.

Li altiris ŝin pli apuden, sed ŝi mallevis la kapon kaj li ne plu vidis ion de ŝia vizaĝo.

„Marinjo”, li diris denove sopirante. Sed ŝi ne moviĝis kaj silentis. Kaj la grandaj pluveroj frapetis malrapide sur la foliojn kaj la merlo eligis siblante la lastan makuleton da lumo el la aero. Sed en la kuirejo eksilentiĝis kaj subite la fenestro heliĝis per flava lumo kaj Charlot kriis ĉe la pordo : „Eniru rapide, pluvas, kaj la manĝaĵo estas preskaŭ preta”!

Marinjo eltiris sian manon el tiu de Pallieter, ekstaris kaj foriris nenion dirante.

Pallieter restis kuŝanta, sufokiĝanta sub la feliĉa sento, ke ankaŭ Marinjo amas lin, etendis siajn kruojn kaj lasis fali la molan pluvon kiel balzamon kaj kapturigaĵon sur sin. Tradukis JAN VAN SCHOOR.

FEBRUARO 1918.

El la katolika nederlanda gazeto „De Tijd” (La Tempo) el Amsterdam ni tradukas la sekvontan tre interesan artikolon :

„Estas en Belgujo, kaj do certe ankaŭ en la eksterlando, ne de multaj sciataj, ke la belga registaro mem je certa momento estas pensinta pri tre efikaj reformoj de la ŝtatorganizaĵo.

Estis en Februaro 1918. La aktivistoj en la okupita regiono okupis sin pri la solvo de la nacieco-konflikto. Iliaj deligitoj estis estintaj al Berlino. La imperia registaro estis promesinta administracian disigon kaj deklarinta krom tio, ke la germana registaro ĉe la kontraktado de la paco farus la eblon por rekonigi la memdecidrajton de la Flandra popolo. Kontraŭago ne povis forresti je tio de belga flanko. La registaro en Le Havre provis ĝin per minacoj ; dekret-leĝoj estis publikigataj ; ĉiu, kiu dum la okupado estus intence kunlaborinta al la reformo de la ŝtataj institucioj, estus punota per punlaboro aŭ per la morto. La aktivistoj daŭrigis sian laboron. La disiĝo de la departementoj de ĝenerala administrado estis efektivigata, la memstareco de Flandrujo estis proklamita kaj popolkonsiliĝo kunvokita. En la belgaj gazetoj, kiuj aperis ekster la okupita regiono, oni nur trovis mokadon pri la aktivista movado. Ĝi estis sensignifa ; estis gvidata de kelkaj perfiduloj, kiuj estis kuntrenintaj grupeton da stultaj idealistoj ; la grandaj gvidantoj de la Flandra movado staris ekster ĝi kaj la popolo abomenis la movadon. Tiel rakontis la belgaj gazetoj. Sed en registaraj rondoj oni tute ne estis trankvila. La sinjoroj de Le Havre tro bone sciis, ke la belga reĝimo estis subpremita la Flandrojn kun nenion ŝparanta krudeco, kaj ke la rajtpostulo fine trovus eĥon en la koro de la Flandra popolo. Kaj la militŝancoj estis je tiu momento ne tiel eksterordinare favoraj. Al la malbona konscienco aliĝis la timo pri ebla malvenko.

Tiam aŭdiĝis la granda parolo. Ministro de Broqueville diris en memorinda kunveno de la ministraro en Le Havre la historiajn parolojn : „La unitara Belgujo finiĝis. Ni devas rigardi fruntan la federalismon...”

La militŝanco aliĝis : la germanoj estis repuŝataj ; en la malordo, kiu estiĝis, la aktivistoj ne ekhavis sufiĉan kontakton kun la soldataro ; la soldatoj estis militlacaĵ, volis iri hejmen ; la flandraj belgicistoj preterlasis sian ŝancon, forregalis sin per nenion signifantaj promesoj kaj la historia momento, kiu estus alportinta la ŝtatan elservutigon de Flandrujo kaj eble la savon de Belgujo, preterpasis neuzite.

La portantoj de la aktivista ideo estis enkarcerigataj aŭ ekzilantaj ; sed la ideo ne mortis ; ĝi vivas pli forte ol iam ; kaj nun multaj memoras, ke oni povas babili pri ĉi tiuj aferoj kun la belgaj registaroj nur kun la tranĉilo sur la gorĝo. Necesas do nur iom da fortformo ĉe la Flandro kaj iom da timo ĉe sinjoroj de Broqueville kaj samintriguloj por igi la politikan memstarecon de Flandrujo de revo je realo.

Flandraj Kantoj Esperantigitaj.

PATRINO KAJ INFANO.

Teksto de FRANS DE CORT.

Muziko de L. MORTELMANS.

Kiam infanon mian
Admiras kun ebri'
Mi kaj l'edzinon, kiu
Donacis ĝin al mi,
Ho ne demandu tiam,
Kiu pli ravas min...
Disigi mi ne povas
L'infanon de l'patrin'.

En miajn brakojn premas
Mi ilin nun kun varm',
Kaj en okuloj miaj
De ĝojo brilas larm'...
Se sciŭs vi, mi flustras,
Kiom mi amas vin,
Patrin', vin pro l'infano,
Infan', vin pro l'patrin'!

LOĜADAS

MULTAJ BIRDETOJ.

Teksto de POL DE MONT.

Muziko de K. MESTDAGH

Loĝadas multaj birdetoj
en nesto de mia kor',
birdetoj de mia ĝojo,
birdetoj de mia dolor'!
Kantetas dum tutaj tagoj
kun ĝojo kaj varm-simpatii'!
Sed ĉiam nur ili prikantas,
amatinet' bela, pri vi!

Vi estas dum la tago
la ridetanta sun',
vi estas dum la nokto
la hel-lumanta lun'!
Vi estas la kara amata,
la mondo kaj ĉio por mi!
Kaj tial birdetoj kantetas,
amatinet' bela, por vi!
Tradukis JAN VAN SCHOOR.

AŬTUNAJ IMPRESOJ.

Nigraj nuboj preterflugas
sur l'aer' kun maltrankvil',
nur kelkfoje trapenetas
kiel adiaŭ sunbril'.

Pluvas, hajlas kaj ventegas:
naŭza iĝas la veter';
por longdaŭra vintrodormo
sin pretigas nun la ter'.

Post mallonga vivo mortis
ĉiu floro, ĉiu plant';
ĉiuj birdoj jam forflugis
al pli milda, varma land'.

Kun velkintaj la folioj
ludas la blovanta vent';
la susur' de l'nudaj arboj
sonas kiel akra plend'.

Sunobriilo, birdkantado
kaj vivemo estas for;
same kiel la naturo
nun ekdormas mia kor'.

Originale verkis MARTHA VERVLOET.

(Premiita en la XIV aj. Internaciaj Floraj Ludoj).



Bretona Herokruco.



La 15an de Septembro estis inaŭgurata en Boesinghe apud Yperen Bretona herokruco je l' memoro de l' Bretonaj soldatoj mortintaj dum la gasatado de la 22a. de Aprilo 1915. Estas kruco kiu de Bretonujo mem estis transplantata al Flandrujo.

Kvarfolia Trifoli'.

Al mia flinaro.

Kvarfolia trifoli',
Kiel bela estas vi ;
Inter ĉio ja kreita
Estas vi la elektita ;
Kiel bela estas vi,
Karniĝinta poezi'.

Mia dolĉa idili',
Kiom riĉa estas vi ;
Kunsenfina perspektivo
Kuşas antaŭ vi la vivo ;
Kiom riĉa estas vi,
Viviĝinta fantazi'.

Multkolora papili',
Faru vian vojon vi
Tra ekstaro kaj refalo ;
Vivo estas ja batalo ;
Faru, lernu, venku vi,
Kvarfolia trifoli'.

ADRIAAN KLOEK.

INTER NI.

El Aalst. — Pioniro. — La tuttaga festo, kiu okazis dimanĉon la 13an. de Oktobro, sukcesis eksterordinare. El preskaŭ ĉiuj urboj samideanoj estis kunvenintaj kaj eĉ ĉeestis angla, germana kaj holanda samideanoj. Nia simpatiinda amiko Bas, gvidanto de la unua Esperanto kurso en Aalst, estis simple sed kore festata : li ricevis belan foton de siaj gelernintoj kaj estis dum la festeno laŭdata i. a. de S-ro Schoofs, nome de Belga Ligo, de S-ro Van Schoor, nome de la Flandraj esperantistoj.

Matene oni vizitis la urbon, posttagmeze oni faris digestian promenadon en la belega parko. Vespere okazis koncerto en la per la flandraj koloroj ornamita salono de „Boerenbond” kaj estis ludata „Angla Lingvo sen Profesoro” de gemembroj de la Brusela Grupo Esperantista. Poste okazis dancado, kaj antaŭ la fino nur foriris kontraŭvole tiuj, kiuj devis trafi la vagonaron.

El Kortrijk. — Samideano el Kortrijk, kiu fervore propagandas por nia revuo, skribis al ni : „Pri la revuo *Flandra Esperantisto*. — Mi nur povas ĝin laŭdi senrezerve ; ĝi treege plaĉas al mi kaj al ĉiuj grupanoj. Kompreneble mi dezirus ĝin ankoraŭ pli ampleksa, sed tion oni ne povas riproĉi al la eldonantoj, sed al ni, esperantistoj, kiuj devas nutri ĝin, abonante ĝin kaj abonigante aliajn. Mi ne dubas, ke je l'fino de ĉi tiu jaro mi povos duobligi la abonantojn al *Flandra Esperantisto* en Kortrijk.

El Sankta Nikolao. — Al Triumfo. — Deligitaro de nia grupo partoprenis la festojn en Aalst kaj bone sin amuzis. Oni interkonatiĝis kun geamikoj de la antverpena “Flandrema Grupo” kaj skizis planojn por l'estonteco.

Nian iaman prezidanton, s-ron De Boes, nia deligitaro laŭte aplaudis kaj gratulis okaze de la fondo de Ronsa grupo.

La Sta-Nikolaaj bolŝevistoj kripliĝis de plezuro vidante la funebrantan vizaĝon de iu seka Pioniro.

Nova kurso komenciĝis la 18an. de Oktobro. Jam kelkaj novaj membroj sekvas la kurson.

Antverpeno. — A. P. P. K. — Okaze de la 5 a. datreveno de la fondo de A. P. P. K. kaj de la disdono de la diplomoj de la urbaj vesperkursoj de Esperanto okazis la 26an. de Oktobro solena festvespero en la festsalonego de la urba normala lernejo por instruistoj.

La Rekta Vojo. — Du interesajn paroladojn ni havis dum Oktobro : la 5an. Jan Van Schoor de la F. G. E. venis al ni por babili pri siaj es-

perantaj poemoj ; la 12an. S-ro Crols montris al ni kolorigitajn filmojn kaj klarigis al ni, kiel ili funkcias. La granda okazintaĵo dum Oktobro tamen estis nia malferma balo, dum kiu ĉiuj ĉeestantoj bonege sin amuzis.

La 9an. de Novembro okazos interesa parolado de S-ro Lodema pri „600 kilometroj tra Nederlando” ; ĉiuj esperantistoj estas bonvenaj. Nia sidejo estas ankoraŭ ĉiam : Café Amical, Statiestraat.

Flandrema Grupo Esperantista. — La intima koncerto, okaze de la diplomdisdono, estis laŭ ĉiuj vidpunktoj vera sukceso. F^{inoj} Ethel Parkinson kaj Maria Jacobs, s-roj Gommer Torfs, Victor Collet kaj Juul Karnas kaj „last not least” la Mandolinsocieto „Risoluta” estis laŭte aplaŭdataj pro ilia kunlaboro. Akiris diplomon kun plej granda distingo : Lode Morael, Victor Collet kaj Maurits Volders ; kun granda distingo : Gisela Bernard ; kun distingo : Vogelnia Lobe ; kun merito : Michel kaj Maurice Ledez.

Nia grupo nun havas sian sidejon en „Pannenhuis”, Conscienceplein, kie ĝi ĉiumerkrede kunvenas kaj kie okazas la kursoj. Ĉi lastaj rekomencis la 30an. de Oktobro.

En nia nova sidejo nin jam vizitis blank-rusa samideano Paŭlo Maj-suko, maristo, kiu rakontis al ni multajn interesajn aferojn pri Blank-rusujo.

MART.

BIBLIOGRAFIO.

(Ni recenzas duope senditajn verkojn, unuopajn ni citas. Ĉiu verko estas havebla ĉe „Flandra Esperanto-Instituto”).

RICEVITAJ REVUOJ.

Breiz Atao, 66, 67, 68, 69, 70, 71 ; La Movado, 124-125 ; Barcelona Stelo, 11 ; Holanda Esperantisto, 91, 92 ; Vegetarano, 3 ; Oomoto Internacia, 33-34a ; British Esperantist, 294 ; Espero Katolika, 65, 66 ; Utrechta Esperantisto, 9 ; Informoj de E. A. E., 90-91 ; Dordrechta Esperantisto, 9 ; Ons Vaderland, 40 ; Marto, 10 ; Sennaciulo, 261 ; Bulteno de Ĉ. A. E., 2 ; Hinda Esperantisto, 4 ; Lingvo Internacia, 2 ; Aŭstria Esperantisto, 8-9.

SUBTENO POR NIA REVUO.

Ĉiumonate : W. C., 10.— ; Fik, 10.— ; Zus, 10.— ; Mart, 10.— ; Jan, 10.— ; Théry, 10 ; Pittoors, 10.— ; Mafrans, 10.— ; Vercauteren, 10.— ; monkollekto dum la festo de F. G. E. en Uilenspiegel, 110.— ; verloren wedding Jan aan Charel, 5.— ; schuld Sus aan Jan, 5.— ; Mart, profito en Arnhem, 30.— ; Eulaers, 10.— ; 86 numeroj vendataj dum la festotago de „Pioniro en Aalst, 86.— ; Boumans, 10.— ; 23 numeroj vendataj de Jan dum balo R. V., 23.— ; **entute : fr, 369.—.**

Esperanto door Zelfonderricht.

4^e LES

Vertalingen der derde les.

TRADUKO. — Mi kredas je Dio. Vi forrestis longtempe, mia amiko. Kiel estas, estas ĉiam plezuro. Ŝi pensas, ke ŝi estas bela. Ni malantaŭeniras neniam! Vi amu vian patrolandon (of: patrujon) kaj ĝian lingvon kaj ĝian gloron. Ili havas orelojn kaj ili ne aŭdas. Mia patrino estis sankta virino. Mia vi estas, mia! Amu viajn gepatrojn. Neniu estas kontenta pri sia sorto. Ŝiaj haroj estas orblondaj. La leono estas la reĝo de la dezerto; ni aŭdis ĝian muĝadon malproksime (of: en la malproksimo). Donu al ni nian ĉiutagan panon. Mortintoj, de el viaj tomboj vi krias al ni. Ili volas sian rajton. Mi kisis ŝian buŝeton. Mia fratineto estas ĉarma knabino. Li metis sian kapon en la buŝegon de la leono. Tio estas belega! Ŝi ridetis pro lia stulta babilado. Li ridegis de ĝojo.

VERTALING. — Mijn zuster is ziek. Het huis van zijn vriend staat in den buiten. Waar zijn de kinderen? Zij zijn in den tuin. Waar is de stoel? Vóór het venster. Achter het huis is een hof. Zullen uwe vrienden komen? Mijn grootvader is oud; mijn grootmoederken ook. Frederik verloor zijn hart tijdens het laatste bal. Een juffer is heen met zijn hart. Waart ge gisteren thuis? Waar zijn onze hoeden? Ziehier de uwe. De appel is van u, de peer is van u, de kersen zijn van mijn nichtje. Zijn broeder heeft een strooien hoed. Het sneeuwde; de straten waren wit van den sneeuw. Hoop geeft geen brood. Ik onderwijs Esperanto aan mijn kind. Zij smeekte God om den dood. Een mensch leert gedurende zijn heele leven. Het geld regeert de wereld. Men weet niet, wie van ons morgen sterven zal. Wanneer het te Parijs regent, motregent het te Brussel. Één zwaluw maakt een lente niet.

TELWOORDEN.

Grondgetallen, onveranderlijk: nulo, 0; unu, 1; du, 2; tri, 3; kvar, 4; kvin, 5; ses, 6; sep, 7; ok, 8; naŭ, 9; dek, 10; dek-unu, 11; dek-du, 12; enz.; dudek, 20; dudek-unu, 21; enz.; tridek, 30; kvardek, 40; enz.; cent, 100; mil, 1000; miliono, 1.000.000. — 1302 = mil tricent du; 1929 = mil naŭcent dudek-naŭ.

De *naamwoorden* vormt men door bijvoeging van o: unuo, eenheid; deko, tiental; dekduo, dozijn; cento, honderdtal; enz.

De *rangschikkende telwoorden* door bijvoeging van a: unua, eerste; dua, tweede; deka, tiende; centa, honderdste; enz.

De *bijwoorden* door bijvoeging van e: unue, ten eerste; due, ten tweede; enz.

De *breukgetallen* door het achtervoegsel **on** : duono, helft; triono, derde; ses okonoj, 6/8; sep naŭonoj, 7/9; enz.

De *vermenigvuldigtallen* door het achtervoegsel **obl** : duoble, tweemaal; triobla, drievoudig; okoblo, achtvoudig; enz.

De *verzamelende telwoorden* door het achtervoegsel **op** : triope, gedrieën; kvarkvine, gevijven; enz.

— De *accusatief* wordt, benevens om het voorwerp aan te duiden, nog gebruikt :

om een *beweging in de richting aan te duiden* : Mi vojaĝas Holandon, ik reis naar Holland ;

voor de *dagteekening* : la 1an. de Novembro, den eersten November ;

voor de *aanduiding van den duur eener handeling* : mi laboris ses tagojn ; ik werkte zes dagen ;

voor de *bepaling van maat of prijs* : tiu vojo estas dek kilometrojn longa, die weg is 10 km. lang ; la libro kostas dek frankojn, het boek kost tien frank.

Voor al deze gevallen is men niet verplicht den *accusatief* te gebruiken ; men mag ook zeggen : mi vojaĝas al Holando ; je la 1a. de Novembro ; mi laboris dum ses tagoj ; tiu vojo estas je dek kilometroj longa ; la libro kostas po dek frankoj.

De *bewoner* eener plaats of provincie (niet van een land), alsook de *genoot* van een godsdienst, partij, enz. wordt aangeduid door het achtervoegsel **an** : Antverpenano, antwerpenaar ; Limburgano, limburgere ; kristano, kristen ; sampartiano, partijgenoot ; enz.

Met het *achtervoegsel ar* worden *verzamelwoorden* gevormd : arbo, boom ; arbaro, bosch ; soldato, soldaat ; soldataro, leger ; enz.

Het *voorvoegsel dis* duidt verdeling, verspreiding aan : doni, geven ; disdoni, uitdeelen ; iri, gaan ; disiri, uiteengaan ; enz.

VERTAAL. — Dr. Van de Perre overleed te Antwerpen den 4ⁿ Augustus 1925. Karel Ledeganck werd te Eecloo geboren den 9ⁿ November 1805. Ik kocht drie kilogram suiker en een kilogram koffie. Maart is de derde maand van het jaar. Ik ben de vierde. Frederik is de zevende en Karel is de laatste van onze klas. Een week is het tweeënvijftigste deel van een jaar. Juli is de zevende en December de laatste maand van het jaar. Dit is onze tweede flesch wijn. Zondag is de eerste dag van de week. Kom Dinsdags of Vrijdags. (Het) is vandaag den eersten November. Hebt gij het zesde deel ? Neen, mijnheer, ik heb het achtste. Twintig is de helft van veertig. Hoeveel is twee derden en drie tienden ? Ik ga naar Brussel. Hij werkte slechts enkele weken gedurende het heele jaar. Ik kocht drie meters van die stof ; zij kostte vijftig frank per meter. Gaat uiteen ! In het bosch woonde een mooie fee.

WOORDENLIJST (raadpleeg zoo noodig de vorige woordenlijsten). — overlijden, morti; Augustus, aŭgusto; geboren worden, naskiĝi; November, novembro; koopen, aĉeti; kilogram, kilogramo; suiker, (da) sukero; koffie, (da) kafo; Maart, marto; maand, monato; jaar, jaro; laatste, lasta; klas, klaso; week, semajno; deel, parto; Juli, julio; December, decembro; dit, ĉi tio; flesch, botelo; wijn, (da) vino; Zondag, dimanĉo; komen, veni; Dinsdag, mardo; Vrijdag, vendredo; vandaag, hodiaŭ; November, novembro; hoeveel, kiom; Brussel, Bruselo; enkele, kelkaj; geheele, tuta; meter, metro; die, tiu; stof, ŝtofo; kosten, kosti; wonen, loĝi; fee, feino.

TRADUKU. — En la somero mi ellitiĝas je la sesa (horo). La paraj nombroj de unu ĝis dek estas: du, kvar, ses, ok kaj dek; unu, tri, kvin, sep kaj naŭ estas la neparaj. Kiom estas sepdek-tri kaj dek? Tio estas okdek-tri. La monato Februaro havas nur dudek-ok tagojn aŭ dudek-naŭ en superjaro. Diru al mi kia estas la kvina monato de l' jaro kaj kia la naŭa. La kvar sezonoj estas: printempo, somero, aŭtuno kaj vintro. Je kia tago estas Kristnasko? Pasko estas en Marto aŭ Aprilo, Pentekosto en Majo aŭ Junio. Kie vi estas? Kien vi iras? La 11an. de Novembro la packontrakto estis subskribata. La milito daŭris pli ol kvar jarojn, preskaŭ kvin. La abono de nia revuo kostas nur dek frankojn; tio estas malmultekosta. La birdoj disflugis. La Bruselanoj parolas nek francan, nek flandran.

WOORDENLIJST. — Somero, zomer; ellitiĝi, opstaan; para, paar, even; nombro, getal; ĝis, tot; superjaro, schrikkeljaar; kia, welke; sezono, jaargetijde; somero, zomer; aŭtuno, herfst; vintro, winter; Kristnasko, kerstmis; Pasko, paschen; Pentekosto, pinksteren; kien, waarheen; packontrakto, vredesverdrag; subskribata, onderteekend; milito, oorlog; daŭri, duren; pli ol, meer dan; preskaŭ, bijna; abono, abonnement; revuo, tijdschrift; nur, slechts; malmultekosta, goedkoop; birdo, vogel; flugi, vliegen; nek ... nek, noch ... noch.

DIVERSAĴOJ.

— Post la komuna manĝado, kiu okazis en Aalst dum la festotago de „Pioniro”, oni komune kantis. La estraro de la festanta grupo estis disdoninta folion kun kantoj i. k. troviĝis „Nia Patrolando”, tradukita de Oscar Van Schoor. Kun entuziasmo preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj kunkantis; nur kelkaj... verdaj vizaĝoj silentis. Juna faŝisto (la unua litero de lia nomo estas Collin) devis montrigi sian koleron forstrekante sur sia kantfolio la vorton „flandra” kaj anstataŭigante ĝin per „BELGA”!

Suĉinfano!

— La decido de la estraro de „Al Triumfo” el Sta. Nikolao ne plu havigi „Belga(n) Esperantisto(n)” al la gemembroj kaj lasi al ili la plej grandan elektliberon aboni ĉu „Katolika(n) Espero(n)”, ĉu alian gazeton, vekigis fine unu el la estraranoj de Belga Ligo. Ĉi tiu skribis al la prezidanto de tiu grupo, i. a. ke... laŭ liaj informoj „Flandra Esperantisto” nur aperos 6 monatojn kaj petegis ree paroli kaj voĉdoni pri la afero. Rezultato : 1 voĉo (verŝajne tiu de la prezidanto) por abonado al „Belga Esperantisto”, ĉiuj aliaj por libera abonado !

Tiu, kiu skribis al la prezidanto de „Al Triumfo”, ne estas bone informita : ĉu li do ne scias ke oni sekrete subtenas nin de el Berlino kaj de el Moskvo ? Kaj fine, sincere : kiu estas pli vivanta, la juna Flandra aŭ la maljuna Belga Esperantisto ?

ĈEĤOJ KAJ SLOVAKOJ.

En „Esperanto”, la oficiala gazeto de U. E. A. (n° Julio-Aŭgusto 1929) ni trovis tre interesan artikolon : „Statistiko pri nacieco kaj lernejoj en Ĉeĥoslovakio”.

„Ĉeĥoslovakaj ŝtatanoj apartenas — oni povas legi en tiu artikolo — al dek diversaj nacioj, inter kiuj la ĈEĤOSLOVAKA enhavas du trionojn de la tuta loĝantaro”.

Kaj la verkinto nomas la dek naciojn, kiuj laŭ li estas : ĈEĤOSLOVAKA, rusa, serbokroata(? ! red. F. E.), pola, rumana, germana, hungara, juda, cigana kaj aliaj.

Kial li parolas pri „ĉeĥoslovaka” nacio, kiam efektive inter la 8.800.000 Ĉeĥoslovakoj estas almenaŭ 2 milionoj da Slovakoj, kiuj parolas slovake, ne ĉeĥe ; kiuj formas do ankaŭ apartan nacion, kiu antaŭe neniam estis kunigata kun la ĉeĥa ?²

Estas klare, ke la verkinto, kiu daŭre nur parolas pri Ĉeĥoslovakoj, estas blinda ĉeĥa patrioto kaj, ke li — same kiel la ĉeĥa registaro, kiu devas danki la ĉielon pro la akirita libereco — estas iom hontema pri la subpremo de la slovaka nacio kaj klopodas kaŝi la veron.

La verkinto ankaŭ parolas pri la *lingvo ĉeĥoslovaka* !! Ŝajnas al ni tiel idiote, kvazaŭ oni dirus „lingvo francgermana” !

Pri la slovaka movado, kiu luktas por la ekzistado de la slovaka lingvo kaj ankaŭ por la aŭtonomio de Slovaĵujo, ni certe verkos apartan artikolon.

Ni, Flandroj, tutkore simpatias kun la slovaka batalantoj por justeco kaj libereco, same kiel ni simpatias kun la luktado de ĉiuj popoloj sub fremda jugo.

Sen justeco la vera paco neniam efektiviĝos !

POL VARENS.

Flandra Esperanto Instituto

Gravinstraat, 32
BORGERHOUT-ANTWERPEN
Poŝtĉekkonto 2427.03

Presado - Eldonado - Librovendado
Propagando - Instruado.
Petu niajn prezojn !

ESPERANTISTEN !
BLINDENVRIENDEN !

ABONNEERT U

op het maandblad van het

Algemeen Blindenverbond
van Vlaanderen

29, Rijselsche baan, Antwerpen-West
Jaarlijksche bijdrage : 10, 30 of 100 frank.
Postcheck 195.224.

Helpt daadwerkelijk de
Vlaamsche blinden.

Ĉiu poeziema esperantisto devas
posedi la belegan poemaron

AMO KAJ POEZIO

de Jan van Schoor

La prezo estas nur 2 *belgoj* (send-
kostoj enkalkulitaj).

De la libro, pri kiu oni en diversaj
esperantaj revuoj parolis kun grandega
laŭdo, estas nur kelkaj ekzempleroj
ankoraŭ haveblaj.

Do rapidu kaj mendu ĝin ĉe „*Flan-
dra Esperantisto*” aŭ ĉe „*Flandra Es-
peranto-Instituto*”.

Baldaŭ aperos

Kantaro Esperantista

La kantaro enhavas pli ol 100 kan-
tojn, kolektitaj de **Juul Karnas** kaj
ĝin devas posedi ĉiu kantema sami-
deano !

Ĉiu grupo aĉetigu la kantlibron de
siaj membroj por agrabligi la kunve-
nojn.

La prezo estas 5 *frankoj*, por tiuj
kiuj mendos la kantaron antaŭ ĝia
apero.

Eldono de „*LA NOVA BIBLIOTEKO*”
ĉe **H. Van der Mast**,
Vlagstraat, 9, Antwerpen.
(Poŝtĉeko 209852).

Algemeen Vlaamsch Huis

„MALPERTUUS”

S. POT - HANSEN

Frankrijklei, 8 - Antwerpen.

Bekend voor zijn extra dranken
o. m. Dortmunder, Spalterbräu,
Leeuwenbier.

Goed koud buffet Goede bediening.

Kunvenejo de l'Esperantistoj.

HUIS DE LEY

Driekoningenstraat. 43, Berchem.

De Ley & Verschueren

CITÉ

N^{rs} 143-144-145-146-147-179-180-
208-209

Groote keus in Vrouw- Manstoffen
Zijde, Fluweel en Voeding.